# KER - Raporto pri partopreno en eventoj

- **Nomo:** Đivo Pulitika
- **Titolo de la evento:** CoMem, EĜA
- **Organizanto(j):** FoJE
- **Tipo de evento:** statuta kunveno
- **Datoj kaj loko:** 21-24 de novembro 2013, Tesaloniko, Grekio
- **Partoprenis oficiale kiel reprezentanto de TEJO:** JES/NE

**Priskribo de la evento.** *(donu informojn pri la programo, la partoprenantoj, la kadro en kiu ĝi okazis, kaj ĉio kion vi taksas relevanta)*

La programo okazis dum 3 tagoj:

**La 21a de septembro**

Oni organizis foiron kie ĉiu partoprenanta organizo povis sin prezenti. TEJO havis budon kaj ni provis kiel eble plej bone prezenti la organizon kaj Esperanton. Ni prezentis plej multe al Grekoj, sed ankaŭ homoj el aliaj landoj (plej ofte partoprenantoj de CoMem) aŭskultis. Malmulte da homoj sciis kio Esperanto estas. Post kiam mi diris kia lingvo ĝi estas, ili volis scii kion ni volas kaj kial ĝi ekzistas. Mi rimarkis ke homoj ne ŝatas ke oni tuj ekparolu pri la uzo de Esperanto kiel lingvo-ponto (ĉu ĝi ne mortis? ĉu ne ekzistas aliaj lingvoj?...). Ili pli ŝatis kiam mi faris la jenon:
- unue mi parolis pri la nuna lingvosituacio en Eŭropo. Ili konsentus ke ni elspezas (tro) multe da mono kaj tempo tradukante ĉion. Ni uzis la kvizon de Nico por montri kiom ili (ne) scias pri la nuna lingvosituacio.
- ili plej ofte konsentus ke ni bezonas alian solvon kaj ke ĝi devus esti unu lingvo, ke ĝi ne apartenu al iu popolo kaj ke ĝi estu facile lernebla. Tiam ni parolus pri Esperanto kaj uzus la alian kvizon kies ideo (laŭ mi) estis montri ke Esperanto ja facilas. Tamen, je mia surprizo, neniu sukcesis solvi ĉion.
Mi tre ĝojis kiam ni ŝanĝis la opinion de iuj homoj (ekzemple skolta knabino kiu sidis apud ni unue ne ŝatis la ideon, sed je la fino parolis al ni ambaŭ kiel amikino kaj tre interesiĝis pri Esperantistoj).

Post la foiro oni prezentis urbojn kiu kandidatiĝis por esti la junulara ĉefurbo en 2016. Laŭ tio kion mi aŭdis plej multe da homoj ĉirkaŭ mi volis ke ĝi estu La Laguna. Sed, fine, ĝi estos iu urbo en Azerbajĝano.

**La 22a de septembro**

La plej grava oficiala parto estis diskutado pri la politikaj dokumentoj. Mi partoprenis tiun pri la kvalita edukado. Oni ne ŝanĝis multon kaj laŭ estis nenio tro menciinda por TEJO aŭ Esperanto. Ankaŭ, ni voĉdonis kaj decidis ke la Uniĝo de germanparolanta junularo de Belgio iĝu plenrajta membro.

La plej grava neoficiala parto por ni estis renkontiĝoj kun la interŝanĝa grupo. Ili ne konsentis kun la estraro pri iuj ŝanĝproponoj de la statuto. Ni decidis subteni ili nome de TEJO. La amandmanon proponis YEU.

**La 23a de septembro**

Novaj AC membroj estis prezentataj. Ni voĉdonis pri proponitaj ŝanĝoj.

**Kiel vi taksas la eventon el la vidpunkto de la organizado?**

Ĝi estis mia unue FoJE-evento do mi ne povas kompari. Sed, laŭ mi, sufiĉe bone organizita.

**Kiuj estis viaj atendoj?** *(kial vi decidis partopreni, kiaspecan eventon vi atendis, … ?)*

Mi volis lerni kaj pli aktiviĝi en TEJO. Ankaŭ, mi volis renkonti novajn homojn kaj vidi ĉu iu el ili povus kunlabori kun TEJO aŭ esperantistoj ĝenerale.

**Kiel vi prepariĝis?** *(ĉu vi pretigis materialon/programeron, ĉu vi informiĝis pri la temo, ĉu vi ricevis subtenon de TEJO/helpon de aliaj homoj, ...?)*

Veronika organizis ret-trejnadon por mi. Mi legis dokumentojn pri TEJO kaj ĝiaj politikoj. Mi ankaŭ skajpe renkontiĝis kun Veronika, Francesco, Łukasz kaj Michael Boris.
Por la foiro mi serĉis printejon kiu printis informilojn pri Esperanto en 4 lingvoj kaj miajn novajn TEJO-vizitkartetojn.

**Ĉu la objektivoj de la evento estis plenumitaj? Ĉu viaj atendoj realiĝis?**

Ni plenumis ĉiujn oficialajn objektivojn - ni partoprenis ĉion, voĉdonis ktp.
Mi trovis iujn homojn kiuj pretas kunlabori kun la kroataj esperantistoj (kaj esperantistoj ĝenerale).
Temas precipe pri homoj el la balkanaj landoj kiuj preskaŭ ĉiam estis kune kaj akceptis min kiel unu el ili.
Verŝajne mi povintus konatiĝi kun pli da homoj, sed mi elspezis tempon kun la interŝanĝa grupo (plejmulto da ili estis ankaŭ balkanoj). Ankaŭ, ĉar estis mia unua fojo, mi sufiĉe ofte parolis al Veronika pri teĥnikaĵoj.

**Kion vi gajnis el via partopreno, kaj kiel vi povas uzi la rezultojn en/ekster TEJO?** *(ĉu vi lernis ion, ĉu vi ekhavis novajn kontaktojn/ideojn, ĉu tiu-ĉi sperto povas esti utila al via agado, …?)*

Mi trovis tre valorajn kontaktojn, verŝajne pli por la kroataj esperantistoj ol por TEJO ĉar iliaj organizoj okupiĝas pri aferoj en Kroatio. Sed mi vidis ke la balkanoj estas sufiĉe fortaj inter la internaciuloj, eble tion mi/ni povus uzi por puŝi niajn aferojn.

**Kromaj informoj aŭ komentoj, se vi havas:**

Mi nur dirus ke la kvizoj kiujn ni uzis dum la foiro estis tre bone akceptitaj, TEJO devus uzi ili pli ofte kaj eble sendi ankaŭ al la landaj sekcioj.